Stipendioj anoncitaj por instruista trejnado!

En 2010 denove okazos unu-jara kurso pri instruista trejnado ofertata de la Universitato UAM (Adam Mickiewicz) en Poznano, Pollando, kunlabore kun ILEI. La aliĝlimo estas aŭgusto 10, la studjaro komenciĝos je la 16a de septembro per unu-semajna ĉeesta sesio. La kurso bezonas minimume dek kursanojn por ekfunkcii. Konfirmo pri kurs-okazigo estos dissendita kiel eble plej frue (do frua sinanoncado estas aprezata!); plej malfrue tio okazos en la 11a de aŭgusto. Plenaj informoj pri la kurso troviĝos en nia hejmpaĝo <www.ilei.info> kaj estos dissendita tra niaj listoj. Eblas viziti ankau la esperantlingvan hejmpaĝon ĉe UAM: http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html

ILEI kaj UEA: kunlabore, same kiel pasintjare!

ILEI (pli precize ĝia Fondaĵo Szerdahelyi) kaj UEA konsentis kontribui po 500 eŭrojn por faciligi la partoprenon de kvar kursanoj. Ili faras tion ĉar la instruada trejnado figuras alte en la prioritatoj de ambaŭ organizoj.

La oferto:

ILEI kaj UEA ofertos **kvar** stipendiojn je valoro de **250 eŭroj**, por mildigi la kursokostojn. Tio kovros proks. 80% de la kosto por B-landano kaj 35% por A-landano. Restas al la kursano kovri la surlokajn kaj vojaĝajn kostojn por la du ĉeestaj sesioj en septembro kaj februaro kaj la kurs-fina ekzamenado. La cetera kurso okazas distance, per reta korespondado kaj rete liverendaj taskoj.

Kondiĉoj kandidatiĝi por la stipendioj estas plenskribi normalan kurs-aliĝilon trovebla en la retejo donita supre, kaj krome skribi duon- ĝis unu-paĝan kandidatigan tekston kun tri eroj:

1) Motivoj por deziri partopreni la kurson
2) Biografieto pri ĝisnunaj profesiaj kaj esperantistaj agadoj
3) Intencoj plenumi instruistan laboron kaj gvidi kursojn rezulte de la partopreno.

Tiun tekston oni sendu rete al Ilona Koutny (kurs-direktoro) <koutny.ilona@gmail.com>, Stefan MacGill (ILEI) <stefan.macgill@gmail.com>, Katalin Kovats <katalin.kovats@gmail.com> (kurs-gvidanto), Zsofia Korody <zsofia.korody@esperanto.de>, (kurs-gvidanto) kaj Claude Nourmont (UEA) <moonmont@pt.lu> ĝis vendredo la 6-a de aŭgusto – sed preferinde pli fue. Tiuj formos kvinpersonan grupon kiu prijuĝos la petojn kaj anoncos la rezultojn en la sekva merkredo, aŭgusto 11. Kaze de fizike skribita peto, sendu al Zsofia Korody, ICH, Grubenhagenstr 6, DE-37412 Herzberg-Harz, Germanio.

La stipendiaj sumoj estas pagotaj rekte al la universitato. Kandidatigo por stipendio estas malferma al ĉiu kiu plenumas la enirkondiĉojn de la kurso, sed ni donos prioritaton al B-landanoj, tiuj sub 35-jaraj, kaj tiuj kiuj plej konvinke skizas kiel ili planas instrui Esperanton dum aŭ post la kurso, pere de la lertoj tie akiritaj.

Sekvapaĝe, jen bildo el la nun finiĝanta kurso: Katalin Kovats gvidas prezenton pri la kontribuo de Andreo Cseh al la instruado de Esperanto. En la foto vidiĝas gajninto de stipendio el 2009.

Sekvos pliaj informoj pri la kurso kaj la atingeblo de Poznano (pluraj rabat-flugkompanioj servas la urbon), kaj la moderprezaj ebloj por tranoktado.

Ni jam en marto apelaciis al ĉiuj Landaj Asocioj de UEA en Eŭropo oferti proprajn stipendiojn por loĝantoj de siaj landoj, ĉar la projekto de UEA kaj ILEI certe ne kovros ĉies deziron. Estas ja en iliaj kaj ĉies interesoj altigi la kvaliton de la enlanda instruado. Pola E-Asocio konsentis eldoni du stipendiojn por loĝantoj de Pollando, kelkaj aliaj asocioj esploras la eblojn. Do, kontaktu vian Asocion demandante, ĉu ili ofertas subtenon! Tio precipe rilatas al A-landoj kaj landoj el kiuj venis la subtenitoj por 2009 (Slovakio, Litovio, Pollando, Hungario).

smg

Iris al ILEI-sekciestroj, ILEI-estraro kaj pliaj: Majo 25; ILEI-komitatanoj kaj e-ins: Majo 26; retejoj ILEI kaj UEA kiel PDF Junio 1
Iros ankoraŭ al Landaj Asocioj de UEA kaj tra pliaj listoj.

Jen eltiraĵo el raporto de partopreninto en la februara studsesio:

Dum ĉi tiu semajno ni daŭrigis la studadon pri diversaj instrumetodoj, prezentis niajn instruistajn kofrojn, kiujn ni iom post iom preparis ekde la unua sesio, interŝanĝis diversajn spertojn. Ĉifoje ankaŭ ekzamenoj atendis nin - tamen organizitaj per vere interesa maniero! Dum kelkaj partoj mi eĉ ne sentis, ke temas pri ekzameniĝo. Poste ni spektis filmojn - erojn de diversaj lecionoj - tio estis tre interesa kaj danke al posta diskuto ankaŭ ege utila kaj instrua por ni. Ĉiu el ni eĉ gvidis modellecionon - ni povis multe lerni unu de la alia kaj montriĝis, ke instruado ne devas esti ĉiam nur "seka", tiel serioza, sed ankaŭ vere amuza afero.
Mi ege ĝojas, ke en Esperanto-mondo ekzistas la ebleco iĝi Esperanto-instruisto ankaŭ oficiale, kaj eĉ post nur unujara studado de metodiko. Kondiĉoj por partopreni la trejnadon estas nur bona lingvoscio (almenaŭ B2), baza kono de E-kulturo, kompreneble emo instrui, tamen - kio estas granda avantaĝo - iuj antaŭscioj pri metodiko tute ne estas necesaj. Dankon al la organizantoj kaj niaj instruistoj, kaj multe da sukcesoj dum la venontaj metodikaj trejnadoj.

Katarína Nosková